



AMERIKA



ESPERANTISTO

E



34

2

March-April, 1925

	Page
XVIII Annual Congress of the Esperanto Association of North America	1
"57 Specoj" G. W. Lee	2
Internacia Konferenco	4
Notes and News from the Central Office E. J. Meriam	5
Radio	7
Necrology	7
La Eklipso Warren Gould	8
Esperanto Abbreviations H. B. Hastings	9
Reviews	11
Book Reviews Edward S. Payson	13
Zamenhofa Monumento	14

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF THE ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—\$1.00.

BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Rooms 309-311 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 1160 Fell Street.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association: Meets each Monday evening at 8 in Room 25, 747 St. Catherine St., West, Sek. G. E. Warner.

OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma Esperantista Societo kunvenas dimanĉe kun Arto kaj Scienco Klubo, 2501 W. Ave. "G", RR6, Box 156, Oklahoma, Okla. C. R. D. S. Oakford, Prez.

WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto-Asocio, third Thursday October to May; Kabea Klubo, other Thursdays throughout the year, at 8 P. M. Class, Thursday, at 7.30. All at 1918 Sunderland Place.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 419 7th St.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

TOPEKA, KANSAS Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-iino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 63 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

The Cleveland Esperanto Society, Hotel Winton, every Monday, 8.00 P. M. S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Society, which has recently suspended its meetings, is being re-organized.

All interested are invited to communicate with the Acting Secretary, S-ro D. W. M. Jenkins, 514 Jarvis Street, Toronto.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y, West Phila. High School for Boys. Barĉo and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barĉo 6.45; business meeting 7.45 P.M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.)

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

Universala Alt-Universitato. Uses, teaches and promotes Esperanto, under the auspices of The Promoters of the Federated Nations of the World, 290 Third Street, Milwaukee, Wis.

ST. PETERSBURG, FLORIDA.

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. 211 7th Ave. North.

Amerika Esperantisto

ORGANO

de la

ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO

507 Pierce Bldg., Copley Square

Boston 17, Mass., U. S. A.

ONE DOLLAR A YEAR

Vol. 34.

March-April, 1925.

No. 2.

XVIII ANNUAL CONGRESS OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA CLEVELAND, OHIO, JULY 8-12, 1925

Headquarters, Hotel Cleveland

Bishop Berkeley who lived in the Eighteenth century, said, on the prospect of planting Arts and Learning in America:—

“Westward the course of empire takes its way,

The four first acts already past;

A fifth shall close the drama with the day,

Time's noblest offspring is the last.”

Ten years ago, in 1915, the E. A. N. A. Congress was in San Francisco, since which time it has not been held far from the Atlantic coast. This year, we can say, paraphrasing Bishop Berkeley:—

Westward the Course of Esperanto Takes Its Way.

With so many groups studying this year in this part of the country it is the logical thing to have a congress as near the centres of these activities as possible.

The Cleveland Esperanto Society is one of the most active groups in North America today, and holds the banner for bringing new memberships to E. A. N. A. But the Clevelanders are modest, and feared they were not *sufiĉe lertaj* to invite a Congress. So it was cheering news to them to be told that as soon as *samideanoj* begin to arrive at a Congress city the Congress takes care of itself, and the local Committee needs only be concerned about the minor details. Come to Cleveland and verify the assertion.

In a few days the full program of the Congress will be sent out; this is simply an announcement in advance, so that vacations can be planned.

Have you ever been to an Esperanto Congress?

If not, there is something yet to live for; if you have, you need no urging.

Are you going to Cleveland this year?

Respond early to the Congress Circular, that the local Committee may complete its plans.

What will you do to help the Congress Committee?

Tell the Committee when you order your Congress ticket.

Are you going to the XVII Congress of the U. E. A. at Geneva, August 2-8, or do you know of anyone who intends going? If so, please notify the Central Office.

Remember the date of the Cleveland Congress: July 8-12.

"57 SPECOJ"

Kiel vi enklasiĝas? Esperanto, simile al ia bona afero, havas siajn sanktulojn kaj siajn pekulojn, siajn klerulojn kaj siajn komerculojn; kaj nepre siajn frenezulojn, kiel la estraro tre bone elkonas. Neniu scipovas la tuton de Esperanto, kaj ĉiu rigardas la lingvon de diversa vidpunkto, agante laŭ sia vidado. Pro tia diverseco la estraro devas renkonti multvarion de homaro. Eble, nu, vi (el la ordinaruloj) iutage havos oficon en la konduko de la movado. Konsekvence profitus vin legi la sekvajn paragrafojn pri niaj diversuloj, por ke vi havu preparitecon por via laboro.

Estas la revemulo, kiu vidas en la kara lingvo novan ĉielon kaj novan teron. Kiam li travivas la neeviteblajn skuajojn, tiu speco ofte realiĝas fortikaĵo. Sed tro ofte li perdas la kuraĝon pro la multeco da malkontentaĵoj.

Estas la plejmultano, kiu penade lernas la lingvon, parolas ĝin malflue, sed volus sveni se oni petas ke li diru kelkajn vortojn en Esperanto ĉe ia formala kunveno.

Estas la subtenanto, le bondezira membro, kiu malofte povas ĉeesti kaj kiun oni kredas ne havi multe da intereso aŭ fido en la progreso de nia afero, sed kiu noble alvenas kiam krizo minacas la vivon de nia grupo aŭ asocio.

Estas la politikulo, kiu ŝatas oficon kaj ĝuas la senton de povhavo, sed bedaŭre tro ofte okazigas jaluzon inter la anaro. Tamen, tia samideano, post kiam li havis iom da sperto je la malagrablajoj kiuj necese renkontas lin, nemaloŝte pruviĝas unu el niaj plej valoraj kunlaborantoj.

Estas la diskutemulo, kiu volus monopoli la kunvenon per senĉesa parolado pri rafinaĵoj de la lingvo—ekzemple, pri "-io" kontraŭ "-ujo." Kompreneble, tiaj diskutajoj estas taŭgaj por la Lingva Komitato, ankaŭ por kunveno de spertuloj, sed en kunveno de ordinaruloj estas nepre tedaj.

Estas la neseriozulo. Tiu havas kion nia fama filozofa Emerson nomus "ducola entuziasmo de ekpreta bolemeco" ("a two-inch enthusiasm of pattypan ebullition"); li fervorigas kaj neniigas, laŭ la blovado de la vento. Sed, okaze tiu samideano helpas; li voĉdonas kun la plimulto kaj lia ĉeesto povas esti grava, kiam estas bezono por agnombro.

Estas la nezorgemulo. Li lernas facile, parolas flue, kaj ne estas ĝenata ĉu la afero, regione aŭ nacie, prosperas aŭ ne.

Estas la hejmlokemulo, jaluza pro la rondo al kiu li apartenas kontraŭ la aferoj de la movado grandamplekse. Li nek legas nek deziras legi la gazetojn kaj librojn kiuj priskribas la okazojn fremdlandajn. Sed, li fosas sian sulkon, kaj tiacele li havas nian profundan respekton.

Estas la memamulo, kiu volas agi propravole kaj emas batali je ĉia oportuno; estas preta kun konsilo, sed hezitas, eĉ riproĉas, kiam oni havas konsilon por li, aŭ kiam oni petas ke li faru ion kion li mem ne proponis.

Estas la verkemulo. Li kondutas bone se nur la eldonanto akceptas lian produkton, sed malkontentigas ĝeniĝe se la verko ne trovas ĵusan presadon.

Estas la propagandemulo, laŭdinda speco (unuavide). Sed okaze tiu samideano volus ekvarbi ĉiun homon en la strato, kaj per sia ardeco helpas enradikigi la ĝeneralan opinion, ke plejparte ni Esperantistoj estas frenezaj.

Estas la instruemulo, kiu volas havi klason senrigarde al sia talento por instruado, kvankam ni devus konfesi ke ofte bona instruisto maturiĝas el la fervorulo kiu persiste sekvas sian emon.

Estas trafulo, kiu fortendis niajn diversajn ulojn de ilia troeco, kaj bone helpas la sanecon de nia movado. Bonŝance, kaj feliĉege, nia Majstro, D-ro Zamenhof, ĉirkaŭvidis la aferon ne sole de tiaj vidpunktoj kiajn ni sugestiis supre, sed de multaj aliaj; kaj pro tio ni povas fidi ke granda estas la estonto por nia kara lingvo. "Homoj povas veni kaj homoj povas iri, sed Esperantismo antaŭenmarŝas por ĉiam." (Ĉu ne?).

Nu, al kiu celo tiu artikolo? Kion ĝi signifas al vi? Eble malmulte. Tamen la estraro, eble, tiuj havante kaj sentante respondecon por la movado tramonde, trovos ĝin suestia, kaj konsentos ke ĉie ni bezonas enketadon por eltrovi kaj decidi pri la taŭgeco de ĉiu samideano rilate la aferon. Ofte ni uzas maltaŭgan volontulon por ofico kiun li malfeliĉe plenumas; kaj laŭe estas dece ke la estraro, regione, nacie, internacie, kunvene kaj kongrese, diskutu kaj zorge pripensu la bezonon por taŭgeco en ĉiu fako, ĉiu entrepreno kaj ĉiu malgranda ago.

G. W. L.

INTERNACIA KONFERENCO

Por la Uzado de Esperanto en Komerco kaj Industrio
Parizo, 14-15-16 Majo, 1925

PROGRAMO

Ĵaŭdo 14

Vespere 20.45. Solena Malferma Kunsido, en la granda amfiteatro de la Sorbonne, sub la prezido de S-ro Charles Richet, membro de l' Franca Instituto.

Oratoroj:

S-ro Daniel Berthelot, membro de Scienca Akademio pri "Esperanto kaj Scienco."

S-ro D-ro Pierre Corret, vic-prezidanto de la Societe Francaise d'Études de T. S. F., Prezidanto de l' Franca Komitato por la transatlantikaj provoj pri "Esperanto kaj T. S. F."

S-ro Andre Baudet, membro-trezorestro de l' Pariza Komerca Ĉambro pri "Esperanto kaj Komerco."

S-ro Edmond Privat, prezidanto de Esperantista Centra Komitato (parolado en Esperanto).

Muzika Parto:

Kun talentoplena partopreno de S-ino Demouget kaj de S-ro Murano, ambaŭ el Théâtre National de l' Opera, de plejsprita kanzonisto G. Chepfer. Orkestro, k.t.p.

Vendredo 15

Matene je la 10-a. Laborkunsido ĉe la Foiro de Paris.

(a) Statistika raporto; Esperantistaj organizacioj en diversaj landoj; kiel ilin uzadi por la komerco internacia.

(b) Kiamaniere konvinki la komercistojn pri la rapida uzebleco de Esperanto, konsiderata kiel internacia kodo por skriba kaj parola interkomunikiĝo. Ŝlosiloj Ĉefeĉ.

Posttagmeze je la 15-a. Laborkunsido ĉe la Foiro de Paris.

(a) Instruado de Esperanto en komercaj rondoj.

(b) Raportoj pri la kursoj en diversaj landoj; efektivigo de la deziresprimo de la Venezia Konference.

(c) Komercaj vortaroj; teknika vokabulario.

Vespere je la 21-a. Vesperfesto, organizata de la Pariza Esperantista grupo kun la partopreno de la "Verda Kato."

Sabato 16

Matene je la 10-a. Laborkunsido ĉe la Foiro de Paris.

(a) Disvastiĝo de Esperanto en la komercaj rondoj (komercal foiroj, korespondado, telegrafado, komercal informoj per T. S. F., reklamo, turismo).

(b) Studado de taŭgaj metodoj por plikonigi kaj utiligi Esperanton ĉe la komercistaro.

Posttagmeze je la 15-a. Vizito al la Foiro de Paris.

Esperantaj konversacioj kun la firmagentoj en la "Halls du Bureau Moderne."

Internacia konkurso de Esperanto-Skribmaŝinistoj, organizata de la Asocio Descartes.

Vespere je la 19.30. Bankedo en la Restoracio de la Foiro de Paris.

Dimanĉo 17

Posttagmeze je la 15-a. Vizito al la Ekspozicio de la Modernaj Dekoracioj kaj Industriaj Artoj.

NOTES AND NEWS FROM THE CENTRAL OFFICE

From Dr. Lehman Wendell of Minneapolis comes the following:

Inter la fakultato de la Universitato de Minnesota (Minneapolis, Minn., Usono) sin trovas tri malnovaj esperantistoj, pro kies klopodoj Esperanto fine enpenetriĝis en la Universitaton. Jen mallonga resumo. Lastan aŭtunon klaso en Esperanto starigis kun dekkvin membroj. Interese estas, ke la membroj devis pagi po dek dolaroj por la kurso. La kurso finiĝis frue en Januaro, sed tiel entuziasmaj estas la membroj, ke oni daŭrigas la kurson. Nova kurso komenciĝis la 7an de Februaro kun ĉirkaŭ dek lernantoj. La 27an de Januaro oni havis komunan vespermanĝon, kun bona programo post la manĝo. Paroladoj, lumbrildoj, kantoj. Dudekkvin ĉeestis. La 13an kaj 14an de Februaro la Esperantistoj ludis teatraĵon, "Ĝis la Revido," antaŭ la Kosmopolita Klubo de la Universitato. Tre bone ricevita. Pri la esperantista aktiveco la Universitata ĉiutaga ĵurnalo ofte presigas artikolojn. La urbaj ĵurnaloj ankaŭ parolas pri Esperanto de tempo al tempo. Paroladoj pri Esperanto estis faritaj jene: D-ro Lehman Wendell antaŭ Fakultata Virina Klubo; Prof. E. L. Clarke antaŭ Kosmopolita Klubo; Prof. J. C. Sanderson disaŭdigis 15-minutan paroladon el la granda radio stacio WCCO, Minneapolis & St. Paul. Ĉiuj estis bone ricevitaj. La 28an de Februaro D-ro Wendell parolis pri Esperanto antaŭ la Kosmopolita Klubo de St. Paul, kaj en la baldaŭa estonteco Prof. Clarke parolos antaŭ la Sabata Tagmanĝa Klubo. Kaj fine, pro klopodoj de Prof. Sanderson, la estroj de la potenca radio stacio WCCO decidis dediĉi tutan horon al esperanta programo, la 24an de Aprilo.

Since receipt of the above Dr. Wendell has begun to teach a class in St. Paul; there are twenty in the class.

The Case School of Applied Science, Cleveland (Ohio), is giving its first course in Esperanto. The class is taught by Prof. W. D. Trautman of the Modern Language Department, and is made up of both students and members of the faculty. Full language credit is given the students.

An Esperanto course is just beginning at Stanford University (Calif.), of which details will come later. This was to be expected when a graduate of the Montezuma Mountain School was given full language credit for Esperanto on entering Stanford last fall.

La Hartforda Esperanto Rondo was organized March 25th, with Edward P. Clarke and Miss Celia Adler serving respectively as President and Secretary pro tem. Mr. L. W. Robbins has been the instructor of this group during the winter, and of another group made up of members of the ARRL at their administrative headquarters. Among the latter is Mr. Kenneth Warner, Secretary-Editor, who will attend the International Radio Congress in Paris April 16-20.

The Executive Committee of the International Language Association in the United States, Inc. (IALA), New York, sent out invitations for a small conference to meet Dr. Frederick G. Cottrell, March 21st and 22nd, to consider cooperative work and avoid duplication. Mr. and Mrs. Dave H. Morris opened their hospitable doors for the meetings, thereby ensuring ideally happy surroundings for the deliberations. As only Esperantists were invited the discussions were confined to Esperanto in connection with the general IAL movement.

Miss Leonora Stoeppler, for many years secretary of the New York Esperanto Society, was the secretary of the conference. Besides some well-known New York Esperantists, here were present Mr. C. F. Bardorf of Montreal, President of E. A. N. A., Mr. Ward Nichols, former Secretary of the IAL in Washington, together with representative Esperantists from Philadelphia, Cleveland, Baltimore and Boston. Resolutions were presented at the end of the conference by Mr. Bardorf, and a committee is to be appointed to consider and act upon the questions brought up in the conference.

There were about seventy at the Barĉo of the Harmonio Esperanto Klubo at Hotel Maryland on March 22nd. The special guest of honor was Mr. C. F. Bardorf, President of E. A. N. A., and the usual group were increased by Esperantists from several other cities who were in town. E. J. Meriam, Secretary.

The Central Office receives every month an invoice of "International Language," and is glad to receive subscriptions for this

valuable magazine at 50 cents a year for subscribers to *Amerika Esperantisto* or 60 cents to non-subscribers. It contains valuable propaganda articles.

A very important letter is being issued by the Executive Committee, to which we urge your careful attention, regarding the finances of the Association.

RADIO

This space has been kept open until the very last moment for news of the International Radio Congress now in session in Paris, April 16-20. The only authentic information received so far, tells us that with the organization of the International Union of Radio Amateurs, (of which Mr. Hiram P. Maxim is the President and Dr. Pierre Corret the Secretary), Hartford, Conn. was selected as its headquarters. Mr. Maxim is also President of the American Radio Relay League with headquarters in Hartford. Word has not yet come as to the selection of an internal language, but will doubtless be announced by the press by the time this reaches our subscribers.

NECROLOGY

John Preston Odgen, born in Leeds, England, July 29, 1840, and who came to the United States in June 1886, died in Boston on February 20th.

Mr. Odgen was a linguist, in both ancient and modern languages, being conversant with Latin, Greek, French, German, Italian and Spanish, and like many others, was not impressed with the desirability of an artificial language for a long time. He had watched the rise of Esperanto and felt that it, like other auxiliary languages that had come and gone, might only be a passing fad. However, when popular interest was greatly aroused after the first Congress at Boulougne sur Mer, he devoted much time to the study and took the highest certificates given by the organizations then in existence.

A born teacher, and lecturer, Mr. Odgen allied himself with the Boston Society, and gave courses of lessons in Huntington Hall, Massachusetts Institute of Technology, during the winters of 1905-06-07 which are still enthusiastically remembered by many of the students. So great was the call at that time, that courses were also given by Dr. D. O. S. Lowell, Mr. John Fogg Twombly and Mr. Edward K. Harvey, pioneers in the movement in North America.

In later years Mr. Ogden's interest became more centered in the correspondence aspect of the language and he developed a foreign correspondence which covered every corner of the earth.

S-ro A. P. H. Rollason, Secretary of the Toronto Group died suddenly of heart trouble on Sunday, February 15th while preparing to attend church.

S-ro Rollason, an Englishman was formerly a Baptist minister, and came to Toronto about five years ago where he became associated with Gibbons & Company. He had long been interested in Esperanto and at once associated himself with the Esperantists of Toronto. It was through his energy and confidence that E. A. N. A. was invited to hold the 1922 Congress in Toronto. He devoted much time to the preparations and was untiring in his efforts to make the Congress a success. Subsequently for something over a year he was Editor of *Amerika Esperantisto* until failing health made the work too heavy for him. Mrs. Rollason and the little daughter Hermione, who have returned to England, not only have the sincere sympathy of their Toronto friends, but also of those who have pleasant recollections of the 1922 Congress.

LA EKLIPSO

Kvankam la eklipso je 24a januaro, 1925, ne estis tute kion mi antaŭesperis, malgraŭe mi konsideras ĝin la plej granda spektaklo de mia vivo.

Du minutoj antaŭ totaleco la malheleco suben venadis tavolo, kvazaŭ virego tiradis kurtenojn unu post alia antaŭ tre brila lumilo.

La neĝo viviĝis kaj ekstremis.

La lumo ŝajnis unue nur paliĝi. Poste ĝi ŝanĝis pli blua, kaj eĉ tre funta bluo kun lasta ekbrilo da verdo antaŭ la mallumo.

Alta nuboj en la okcidento paliĝis, malpligrandiĝis, ekmovis kontraŭ la venanta ombro de la luno, alten, suden, kaj malantaŭen.

Momenton sekvantan la mallumo de la luna orbo atingis nin; la steloj ekaperis; anstataŭ la suno estas ŝajne malgranda nigra truo, multe pli malgranda ol la suno kiu estis kaŝita. Ĉirkaŭ la nigra luno estis la krono tiel brila kiel plenronda luno.

Post unu momento la suno ekbrilis preter la nigra luna rando kaj la plej granda vidindaĵo de la centjaro estis finiĝinta.

Warren Gould.

ESPERANTO ABBREVIATIONS

Many writers, especially the European samideanoj, are much given to the use of abbreviations which, although perfectly clear to the user, are often a source of confusion to beginners. From time to time the writer has set down such abbreviations, with their equivalents, and offers the following tentative list, which though far from complete, will perhaps be helpful to some readers. Additions or corrections will be welcomed.—H. B. H.

A. K., antaŭ Kristo	j., jaro
B. E. A., Brita Esperanta Asocio	k., kun, kaj
bfl., metu poŝtmarkon sur bildflanko de poŝtkarto (tion oni ne permesas en Usono)	k. a., kaj aliaj
B'ham., Birmingham, Anglujo	k. s., kaj similaj
ĉ., ĉirkaŭ (proksimume)	k. c., kaj cetere (etc.)
C. K., Centra Komitato, konsistanta el ses anoj, Dro. Privat, Prezidanto	Kot., kotizo
C. E. I., Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto	Kl., Klasa
C. E. K., Centra Esp. Komitato	Kas., Kasisto
ĈF., ĈP., ĉevalforto, ĉevalpovo	K. E. L., Kristana Esperantista Ligo
Dro., Doktoro	K. E. L. I., Kristana Esperantista Ligo Internacia
dez. kor., deziras korespondi	K. A. J. V., Kristana Asocio de Junaj Viroj (Y. M. C. A.)
E. A. N. A., Esperanto Asocio de Norda Ameriko	K. K. K., Konstanta Kongresa Komitato (J. M. Warden, Prez., Edinboro)
Ekz., Ekzercaro de Dro. Zamenhof	K. R., Konstanta Reprezentaro de naciaj societoj
ekz., (e.) ekzemple (e. g.)	ktp., kaj tiel plu
elp., elparolata	k. ĉ. l., Kun ĉiuj landoj
esp., Esperanto, -a	K-io., Ko., Kompanio (Co.)
E. L. A., Esperanta Literatura Asocio	Kp., Komparu
Ev., Enciklopedia Vortaro de Verax	L., letero, lando
E. T., Esperanto Triumfonta	L. K. K., Loka Kongresa Komitato
F-ino (Fino), Fraŭlino	lec., leciono
ges., gesamideanoj	L. K., Lingva Komitato
i. a., inter alia	M., monato
I. A. L., International auxiliary language (internacia help-lingvo)	M. A., membro kaj abonanto
I. A. E. F., Internacia Asocio de Esperantaj Fervojistoj	Nro., No., Numero
I. K. A., Internacia Katolika Asocio	O. A., Oficiala Aldono
I. K. U. E., Internacia Katolika Unuiĝo de Esperantistoj	p., paĝo
I. L. E. P. O., Internacia Ligo de Esp. Poŝt Oficistoj	P-ro., Profesoro
i. p. k., ilustrata poŝtkarto	prez., prezidanto
I. S. A., Internacia Scienca Asocio	p. s., postskribajo
I. T. A., Internacia Teknika Asocio	p. m., poŝta marko
	p. k., poŝta karto
	p. n. k., poŝta karto kun bildo de nacia kostumo
	p. v., plena vortaro
	r. k., respondkupono
	S-ano., samideano
	S. A. T-ano, ano de Sennacia Asocio Tutmonda

S. E. U., Sovjetlanda Esperanta Unuiĝo	t. e., tio estas (i. e.)
Sekr., sekretario	Th., Theodoro
S-ino (Sino.), Sinjorino	U. E. A., Universala Esperanto-Asocio (Geneva)
S-ro (Sro.), Sinjoro	U. E. A. del., U. E. A. delegito
Sm., Spesmilo (about 48 cts.)	U. I. A., Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (Belgujo)
Sd., Spesdeko (about one-half cent)	U. V., Universala Vortaro
S. R., Scienca Revuo	Usono, United States of North America
Soc., Societo	v., vidu
T. E. K. A., Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio	

SPIRITAĴOJ HUMORAĴOJ

“Nu diru do, kial vi ne pluen persekutis la ŝteliston, kiam li kuris en la domon?”

“Ja, aŭdu super la domenirejo estas skribita: ‘Eniro malpermesita!’”—Wecker, Eckert.

“Kio estas plej necessa al la bapto?” demandis la pastra.

Lernanto hezitas iom, Kaj poste diras: “Infano.”

Oni rakontas ke la fama violonĉelisto David Popper, aŭskultis iam fortepianistom kun li ne multe ŝatas. Ĉeestanto demandis al Sro Popper kiel li juĝis la pianiston.

“Li estas rimarkinda,” li respondis, “li venkas la plej grandajn facilajojn kun plej granda malfacileco.”

10,000

MEMBROJN DEVAS HAVI

U. E. A.

EN 1925.

Aliĝu tuj por atingi

10,000

Kotizoj estas::	M.	1	Dol.
	M. A.	2,5	Dol.
	M. S.	5.-	Dol.

Uzu aldonitan aligilon.

REVIEWS

"ESPERANTO"

Anybody who has Esperanto in his system, that is, feels it through and through, is generally a subscriber to the monthly publication "Esperanto;" but we have not statistics to show whether the majority of the readers of Amerika Esperantisto are readers also of "Esperanto." Would that they might be, but assuming that they are not, the following comments on the February issue may stimulate the interest of several to want to read this official organ of the Universal Esperanto Association ("U. E. A."). Note that it is printed in Esperanto throughout.

Almost always, as in this case, the first article is by Edmond Privat, who is the best known of our eminentuloj. He is an eloquent speaker and a delightful writer and this February article entitled "La animo de nia movado" is decidedly worth reading. Privat is notable as not being a stickler for the most rigid grammatical rules; for being a natural linguist he is a natural user of Esperanto, as well as other languages, which he uses flexibly.

The title of the next article, also by Privat, "Radio-Geneve estas fondita," is, of course, timely. There should be a radio station for world broadcasting at Geneva.

The next two articles, by Ernest Archdeacon and Liang-ĉu-vaj, are on the pros and cons of art, the former holding art largely inferior to science, and the latter defending it as inferior to nothing. These two articles are good literature (whether you agree with them or not) and appeal to the thoughtful reader. They are fair samples of the brainy contributions that this publication contains.

"La problemo de la estonteco" (The problem of the future), by Carl Mothander, Stockholm, translated by Hugo Dreusicke, Kassel, sets us thinking on Europe and America and how civilization is going.

Then we have three pages of "Literaturo," half of it poetry, and one of the articles a humorous story with the scene laid in a barber shop.

Next come three pages of news from the Esperanto world: Announcements of the two congresses to be held in Spain, report of the meetings in Denmark, and the familiar "Kroniko." In the Kroniko we have news from

Austria, concerning the Esperanto labor league.

Belgium, announcing an eight page guide to Antwerp.

Bulgaria, telling of trouble with the government and of the progress of Esperanto in spite of governmental opposition; even noting that the Chamber of Commerce and Industry in Sofia has subsidized a course in Esperanto.

China, telling of the Pekin Esperanto College, with fifty students and ten instructors, of the weekly Esperanto features in two different publications, of the 300 page Esperanto-Chinese dictionary.

France, meeting at the Vegetarian Home with a course every Tuesday and Friday; activities in Annecy and Saint-Omer.

Germany, course for post and telegraph officials in Essen, founding of a group in Herne.

Hungary, opening of a course with more than one hundred persons at Gyongyos, for which the UEA delegito opened his private school and in which he gives five lessons a week. (Vote of the group in Gyor, every member must be a member of the Universal Esperanto Association.)

Japan, refounding of the group in Osaka.

Netherlands, stereopticon talk for teachers in Rotterdam.

Persia, activities in Tabriz, and an appeal for Esperanto literature needed by this group.

Poland, news from Katowice, Lublin and Warszawa, telling of courses.

Roumania, reports from Alba-Julia, Bucuresti, Cluj, Targu-Mures and Timisora.

Saar-teritorio, reports of a successful year.

Sudslavio (Brcko), new course.

Switzerland (Burgdorf), new course.

United States (San Francisco), celebration of Zamenhof Day.

All this news testifies to activities throughout Europe and suggests that if we knew the whole story we could multiply these reports tenfold. There follows a column on Esperanto in the schools and universities. In the following places it is taught in the schools and universities: Australia (Melbourne), China (Pekin), France (St. Omer), Germany (Breslau, Gotah, Herne, Magdeburg, M.-Gladbach), Italy (Milan) Persia (Sultanabad), Poland (Lublin, Warsaw), United States (Minneapolis).

(Besides this we know it has been taught in several places in England and on the continent and we have heard that it is compulsory in Czechoslovakia)

There follows two-thirds of a column on propaganda for hotels. The writer says with truth that it is quite as important to promote the language among hotels as it is in commerce and elsewhere.

Then there is the Radio department, giving news from sixteen places.

Then the language studies, which are of particular interest to the grammatically minded.

The pages of official information follow next, while lastly we have the amusement column, the various petitions and suggestions, and finally the list of persons in various countries wanting to correspond or exchange postal cards, etc.

Besides the regular issues there is the "Ekonomia Kuriero," being the commercial and economic international journal sent free as a monthly supplement to Esperanto. No. 1, February, 1925 has articles on the May conference in Paris, the human element in commerce, steel and iron production of the world, and notes on the world market in various countries. Also announcement of several fairs and expositions, with details of the organization of the Leipzig fair, etc.

Then too, there is the "Kongresa Bulteno," in the interests of the 17th Universal Congress of Esperanto, to be held in Geneva, August 2-7, which comes as a supplement to "Esperanto." No. 3 the February issue, has notes on the history of Geneva, which is just what those who intend to go to the Congress will like to read.

G. W. L.

BENSON SCHOOL OF ESPERANTO, INC.

The sample pages of Dr. Benson's mail course in Practical Esperanto, sent out by the Benson School of Esperanto, Inc., 20 Mercer Street, Newark, are of startling interest; and if this school keeps up with the spirited announcement we certainly shall have a great asset in forwarding the interests of Esperanto in North America. Here is a paragraph from the circular letter.

"It is our aim to make the "Benson School of Esperanto" a world-school; for these lessons are shortly to be translated into all principal languages of the world. Hence, we did not spare any efforts nor expense to bring this course up to the highest expectations of the most critical student of Esperantist in any land."

G. W. L.

NAMES OF WOMEN IN ESPERANTO

That excellent magazine, *Literatura Mondo*, in its issue for March 1925, replies to a correspondent who had questioned the use of such forms as Maria, Klara, etc., on the ground that, being nouns, they should end in "O."

After pointing out that the problem of women's names is not completely solved in Esperanto, since Zamenhof himself used such forms as Johanino, Antoniino, together with "Marta," the editor of *Literatura Mondo* declares that it would be intolerably clumsy to give girls such names as Kristianino, Konstantenino, etc., and that the ending "IO," which has been suggested, would result in confusion with names of men in some countries. He then proposes a solution in the form of two rules.

1. Every woman's name to end in "a." Women's names derived from those of men, to be so formed that the final o is changed into a.

This rule is for common use. But for grammarians he has a second rule ingeniously devised to bring his proposal into harmony with the "Fundamento." This rule is as follows:

2. Every woman's name is to be regarded as an adjective qualifying the word *ino* (understood). Thus: Johana (ino), Jozefa (ino). It thus consists of the masculine form used as an adjective and with "ino" understood. If no masculine form exists one is postulated.

By this interpretation no break is made with "Fundamento," and the resulting names are remarkably similar to the national forms, e. g. Maria, Marta, Ida, Ada, Cecilia, Anna, Angelika, Barbara, Eliza, Eva, Flora, Helena, Julia, Margareta, Rebeka, Olivia, Veronika, Viola, Virginia, Zita, etc., while the few names that do not lend themselves to this treatment can be used unchanged as national names.

The proposal seems to us worthy of careful consideration.

H. B. H.

BOOK REVIEWS

BY EDWARD S. PAYSON

La Urbestro de Zalamea, Dramo en tri aktoj. El la Hispana lingvo de Calderon, tradukis Enrique Legrand. 136 paĝoj, 7x4½. Eldonita de la tradukinto, aĉetebla ĉe A. Zeisler, Montevideo, Strato 25 de Majo, 734 Urugway, S. A., prezo—

Ĉi tiu libro estas valora aldono al la drama literaturo de Esperanto, bone tradukita en bona stilo kaj meritas la konsideradon kaj zorgan legadon de amantoj de la klasika dramo. Pri la verko la tradukinto diras: La "Urbestro de Zalamea" estas sendube unu el la pli belaj ĉefverkoj de Calderon. Ĝi estis verkita en la jaro 1651, kaj la saman jaron Calderon fariĝis ekleziulo. Aparte de sia merito literaturo tiu ĉi dramo estis severa kaj kuraĝa leciono kontraŭ tro oftaj ofendajoj de la tiutempa soldataro. Perfortaĵoj de oficiroj kontraŭ honestaj virinoj okazis ofte. El unu el tiuj veraj dramoj eltiris la granda poeto sian teatraĵon. Li maltemis eĉ sub regado de reĝo Filipo II., montri sur publika scenejo, kiel simpla kamparano punas per malnobla mortigo tian perforton, kvankam la krimulo estas kapitano de 1 reĝa armeo."

Ni kore gratulas S-ro'n Legrand pro lia sukcesa kaj artista traduko de malfacila temo. Ĉi tiu verko estas kredeble la unua, kiun oni presigis esperante en Montevideo. Kaj ĝi estas laŭdinda ĉie. S-ro Legrand pruvis per sia traduko, ke li eniris en la spiriton de la originala poemo kaj lerte faris sian laboron de tradukanto.

Bulgara Antologio, prozo kaj poezio, 248 paĝoj, 8½x6. Bulgara Esperanto-Biblioteko, II serĉo No. 5-6, Sofio, Bulgarujo, prezo 5 sv. fr.

The above mentioned book is indeed an Esperanto treasure. It is made of carefully selected gems of Bulgarian literature, and prepared by Ivan H. Krestanoff, whose previous books have been favorably received by all readers of Esperanto. Whether S-ro Krestanoff translated the entire contents of the book we have no means of knowing: that he could do so is without doubt, as he knows Esperanto as his mother language. So great was the success of S-ro Krestanoff's books treating of Bulgarujo that he was called upon to give further examples of the literature of his native land.

"Bulgara Antologio is a book that ought to be standard and read from time to time. It is a library in itself; a book that cannot soon be exhausted. Nearly every selection has a picture of the author and a short sketch of his life and work. There is also a charming antaŭparolo by At. D. Atanasov. The preseraroj—and they are ever with us—will be found corrected on a special page.

This book requires more than casual mention. It is well worth an extended review. It is along the lines of the Krestomatio and fulfills the same purpose. Could one be the owner of but two books of Esperanto literature, let them be "La Krestomatio"—Zamenhof, and "Bulgara Antologio"—Krestanoff.

ZAMENHOFA MONUMENTO

Grava Tago

La 18-an de Januaro, ĉiuj anoj de Varsovia Monumenta Komitato kune kun la plej proksimaj parencoj de nia kara Majstro kunvenis are ĉe la Tombejo, por saluti la jus alvenintan el Skotlando preta Zamenhofs Monumento. La Monumento feliĉe trapasis la Maron, de Danzigo al Varsovio, bone elportis fervojon kaj liberigita de limdepago dank' al la subteno de Pola Registaro, ankaŭ de la parto de la transporta tarifo. Dank' al penoj de nia S-ano Aleksander Rozanykwiat posedanto de la loka konata Transport—kaj Ekspeddomo, kiu oferis sian laboron tute senprofite, la monumento estis sendifekte transportita tuj post alveno tombejon, tie starigita laŭ la plano de ĝia aŭtoro skulptisto Lubolshi. Hodiaŭ la 18-an de Januaro la Varsovia S-anaro kun la Monumenta Komitato en la ĉefa speciale alvenis por kune solene festi tiun gravan por ni momenton. La Monumento plaĉis al ĉiuj, kvankam ĝi estas simpla modesta tamen faras tre estetikan impreson, ĝia modesteco similas bone respektive al la modesteco de nia Geniulo Zamenhof. Ĉiuj estis kortuŝitaj kaj sendis salutleterojn al la Internaca Monumenta Komitato, al U. E. A. k.t.p.

Ni atendas la oficialan solenan malkovron de l'Monumento. Tiu ĉi momento devas baldaŭ veni kaj allogi la alvenon de multaj samideanoj al la Majstra Tombo.

Ad. Oberrotman
membro de l' Varsovia
Monumenta Komitato.

LULO

Dormu! Dormu! Dolĉa infano.
La nokto estas nigra—nigra.
La luno ne brilas, nek la steloj.
Dormu! Dormu!

Morgaŭ vi vekos je la suno,
Je la floroj, je la birdoj,—
Sed nuntempe,—en la nokto—
Dormu! Dormu!

HO, ĈIU BONVOLUL'!

Pacon sur tero ĉe homoj Kiujn direktas bonvol';
Ĉiam felicon en domoj Kie plenumigas la rol'.

ĤORAJO

Amon, amon al Di'; Amon, amon al hom';
(Amon al Di' jes amon al Di'; Amon al hom', jes amon al hom');
Kantu, varbu kaj servu, Ho, ĉiu fervorul'!
Dio benos per vi, Dio benos per ni;
(Benos Di' vin, jes benos Di' vin, Benos Di' nin, jes benos Di' nin);
Tra tuta mond' estu respond', Ho, Ĉiu bonvolul'!
Certe malbonon forigas Forta kaj saĝa bonul';
Sentojn bonvolajn fortigas Justasintenadul'.

(Ĥor.)

Inter nacioj kaj firmoj Justa, ja justa traktad'
Kaŭzas ke ĉiam kaj ĉie Kreskas amika farad'.

(Ĥor.)

Ho! Interkomprenado Kaj nobla Interkonsent'!
Per vi la tuta homaro Iĝu kiel gent'!

(Ĥor.)

De L. S. Ware.

LA FENESTRO

Vidas per mia fenestro
La tagiĝo, griza, verda
Kun nuboj naĝantaj
En la solena ĉielo.
Vidas per mia fenestro
La suno kiam ĝi levas;—

Nuboj rosaj, aŭreaj
En la tuta ĉielo.
Vidas per mia fenestro
La luno en la nokto
Kiel ŝip' argenta
Velanta ĝis la tago.

BULGARA ESPERANTISTA KOMERCA AGENTEJO

Simeon Bardaroff

Strato Neofit Rilski 30, Sofia, Bulgarujo

Tre Estimataj Samideanoj:

Per ĉi tiu mi havas la honoron informi vin pri fondo de la nova komerca agentejo por akceli plivigliĝon de interrilatoj ĉiulandaj. Starante en la bulgara komerca kaj agronoma vivo de post kelkaj jaroj, mi prenas sur min la taskon liveri al mia klientaro ĉiujn bezonataĵojn de metiaj, industriaj kaj terkulturaĵoj aŭ vendi iliaj tiaj en mia lando. Krom tio mia firmo povas pro fremda konto partopreni en ĉiuj stataj komercaj entreprenoj.

Ĉar mi ĝuas ĉie la revendistan rabaton kaj solvendisto en esperantujo por multaj gravaj entreprenoj kaj ĉar mi ĉiam povas konsideri min kiel via konfidulo, vi pere mia firmo atingos ĉiam kiel eble plej favorajn kondiĉojn por enaĉeto aŭ vendeto, livero kaj ekspedo. Ĉu mi do povas esperi, ke la karaj samcelanoj—inoj apogu mia penadon? Certe, kiam vi deziras aĉeti aŭ vendi ia ajn obejekton el aŭ por Bulgarujo turnu vin al mi kaj postulu kontraŭ respondkuponoj aŭ poŝtmarko aŭ mono prezinformojn.

Bonvolu komuniki ĉi tiun proponon ankaŭ al amikoj kaj neesperantistoj. Konstante preta por vin servi, akceptu la esprimon de miaj respektplenaj sentoj.

Altestime:
Simeon Bardaroff.

BONA ĈASISTO

Iam ĉasisto ekvidis trans riveron Urson kaj Cervon, kaj volante kapti ambaŭ, deprenis la botojn, kaj vadis ĝis la alia flanko de la fluo, kaj enpelis en stumpon sian ĉastranĉilon ĉe la propra angulo.

Li tiam pafis la tranĉilon tiom lerte ke lia kuglo disfendiĝis, kaj duono da ĝi mortigis la Cervon, kaj la alia duono mortigis la Urson. Dum li vadis la riveron, li kaptis en poŝo, Lutron, kaj en la alia, Miogalon; li kaptis en sia pantalonoj, tiom grandan amason da fiŝoj, ke ilia baraktadon disrompigis butonon, kiu forflugis kaj senkonsciigis Fazanon.

Kaj kiam li revtnis, li trovis ke unu el liaj botoj estis okupata de lutreolo, kaj la alia, de Arĝenta Vulpo; tiel li pensis ke li havis bonan ŝancon.

Esperantigis G. Lackey, Brattleboro.

NUR 3 CENDOJN

kostas unu numero de la esp. ĵurnalo

HEROLDO de ESPERANTO

ĉe semajna ekspedado.

Jarabono (100 numeroj) : 3 dolaroj.

Abono por 8 monatoj (66 numeroj) 2 dolaroj.

Abono por 4 monatoj (33 numeroj) 1 dolaro.

“Heroldo de Esperanto” estas grandformata, ilustrita kaj aperas dufoje en la semajno.—Raportas pri Esperanto—movado, socia vivo, politiko, komerco, trafiko, scienco, tekniko, radio, arto, sporto, filatelio ktp.—Literatura parto en ĉiu numero.

Petu per poŝtkarto tute senpagan specimenon de la administracio

Heroldo de Esperanto, Horrem bei Koln (Germanujo).

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE

BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The **ESPERANTO OFFICE**

Drop us a postcard asking for a catalog

THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usona

MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France) Po \$.50.

La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)
La AKROBATO de Nia Sinjorino
BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)
MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la Milito
(Giesy) Po \$.35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de
S-RO EDWARD S. PAYSON

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko
Aĉetebraj ĉe la Esperanto Office,
Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k. Alex Zubkus, 427 Hanover Street, Portsmouth, N. H.

S-ro V. A. Platnikov, Rusujo, Moskvo, Ordinskiĵ Tupik d. 6, Rv. 19, sendas salutojn al siaj malnovaj korespondantoj kaj deziras renovigi korespondadon kun ili. Ankaŭ deziras korespondadi kun Esperantistoj de ĉiuj landoj. Promesas respondi. Li povas interŝanĝi librojn, gazetojn, journalojn, p.k. aŭ leterojn, k.t.p.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Ĉeĥoslovakia.

Chas. Scanlon, University, Alabama (Usono) kolegia studento deziras studentajn korespondojn. 11

Roy Johnson, 1168 W. 24th Street, Los Angeles, Calif., deziras korespondojn en ĉiuj landoj 11

To Maintain Your Pupils' Interest During and After the Introductory Course
USE

A Textbook of the Method Used in Modern Language Teaching

SPOKEN ESPERANTO

by the
DIRECT METHOD FOR BEGINNERS
(For teachers and their classes)

91 6x9 printed pages; illustrated; diagrams; metrics; relation to other languages; index



The direct way is the shortest way to learn Esperanto

Stiff Paper \$.50 Cloth Edition
Sent with LEAGUE of NATIONS Report on Esperanto (Sept., 1922) and a 'key' for \$1.00

N. W. FROST
18 Ash St. Pl., Cambridge 58, Mass.

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po paĝo—¼ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

STUDY ESPERANTO



ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY
REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language

Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,
Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY

By vote of September 21, 1922

HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA

and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)

The Central Office of the Esperanto Association of North America
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies